

Esperanto-Informilo

62-a jaro

por Berlino kaj Brandenburgio

(653) 08-09/2011

Ĉu informilo aŭ invitilo?

Pro abundo de eventoj, aŭ festecaj – somera festo en Jüterbog, dekjariĝo de Esperanto-Domo – aŭ pli seriozaj kaj administraj, nome la jarĉefkunvenoj de la junularaj asocioj, grandan parton de tiu ĉi eldono de la EIBB okupas diversaj invitoj. Tamen restas sufiĉe da loko por amplekse raporti pri okazintaĵoj kiel la aranĝo pri Adolf Sproeck kaj la Germana Esperanto-Kongreso, ekzemple, kaj eĉ por saluteto el Kijlo far Beate Mielke, multjara Berlinanino kiu antaŭ du jaroj translokiĝis Nordgermanien.

Dokumentoj de vivo

Ekspozicio rekonstruas la vivon de Adolf Sproeck

Al esperantistoj Adolf Sproeck (1890-1978) estas konata kiel grava socialdemokrata laborista esperantisto kaj kiel siatempa prezidanto de Esperanto-Ligo Berlino (ELB). Ke la tapetista majstro ankaŭ estis unu el la 45 deputitoj de la unua distrikta parlamento de Berlin-Prenzlauer Berg post 1945 estis longatempe nekonata.

Tion kaj aliajn faktojn nun enhavis ekspozicio pri la vivo de Sproeck, al kies malfermo invitis la kulturasocio Prenzlauer Berg je la 26a de junio 2011 en kulturcentron danziger50. La prezidanto de kulturasocio Thilo Schwarz-Schlüß kore salutis la 25 vizitintojn. Li esprimis surprizon pri la amaso da interesaj informoj, kiujn enhavas la ekspozicio preparita de la fakgrupo Esperanto, kiu kunfondis la kulturasocion antaŭ pli ol 20 jaroj kaj kiu ĝis hodiaŭ kontribuas al ĝia kultura vivo.

La ekspozicio montras dokumentojn kaj fotojn pri jenaj temoj:

- Hejme en Prenzlauer Berg 1908-1949

- Adolf Sproeck – la laborista esperantisto 1911-1956
- Metia majstro kaj distrikta deputito 1925-1948
- Esperanto-kulturo en Okcidenta Berlino 1949-1978
- Germanaj Esperanto-Kongresoj 1960-1970
- ASO – la ĉefrecenzento 1958-1970¹
- Tradukoj el la germana literaturo 1907-1978.

La vizitintoj de la ekspozicio aŭdis de Ina Tautorat la historion de la valizo, kiun ŝi kune kun sia edzo Hermann transprenis post la morto de Sproeck en 1978 de la filo por savi la enhavon, kiu parte jam estis en rubaĵosako.


La junaj geedzoj modernigis en la 70aj jaroj la Esperanto-vivon en Okcidenta Berlino sed ankaŭ konservis valoraĵojn el pasintaj tempoj.

¹ Sub la kaŝnomo ASO Sproeck publikigis multajn recenzojn pri Esperanto-literaturo



Afiŝo de la ekspozicio

Estis savita ekzemple la ekzamena dokumento de la tapetista majstro el 1925 kaj la membrokarto atestanta ke Sproeck ekde 1948 estis membro de Germana Esperanto-Asocio (GEA). La plej malnova dokumento, el la jaro 1907, estas la unua provo de traduko en Esperanton (Heine-poemo «Belzacar»). Por la historiisto ege interesaj estas kvin eldonoj de manskribita Esperanto-gazeto el la tempo de la Unua Mondmilito (1916-1919) enhavantaj ankaŭ per mandeseĝnaĵoj ilustritajn «leterojn el Berlin», en kiuj la aŭtoro Th. Richter rakontas el la ĉiutaga vivo dum la milito. Ankaŭ valora estas serio de artikoloj de Adolf Sproeck kun propraj travivaĵoj el la historio de la Laborista Esperanto-Asocio (LEA).



Multaj unikaj originalaj dokumentoj de la ekspozicio originas el valizo kuŝinta 33 jarojn en la arkivejo de la Esperanto-Ligo Berlino. Okaze de la 120a naskiĝdatreveno de Sproeck en 2010 ni malfermis ĝin.

La teksto «Sur la bazo de demokratio» (Germane: «Auf der Plattform der Demokratie») de decembro 1945 klarigas la poziciojn de Sproeck kiel distrikta deputito de Socialdemokrata Partio de Germanio (SPD). Li videbligas, kial li rilate al demokratio konfidis al SPD. La dokumento finiĝas per la vortoj: «Se ni ĉirkaŭrigardas, ni devas konstati, ke la demokratio en Germanio ankoraŭ havas neniun bazon, ke

ĝi ankoraŭ estas ne plu ol dezirrevo. Sed revo, kies efektivigon ni sopire alstrebas.»

En la teksto «Ĉu interna ideo?» (supozeble el 1947/1948) Sproeck skribas: «Kaj se iu ajn samideano eble emas pridubi mian rajton partopreni la diskutadon pri ĉi temo, li sciu, ke mi mem havis judan patrinon kaj judan bopatrinon. Ke mia filo suferis sub hitlerismo kaj posedas dokumenton kiel "Viktimo de faŝismo". Kaj ke estas feliĉa hazardo, ke mi vivas ankoraŭ kaj povas aktive kunlabori je la kreado de demokratio socialista en Germanio.»

En la berlina Landa Arkivejo dokumentoj klarigas la situacion de Sproeck dum faŝisma tempo.

Konservitaj korespondiĵoj permesas pluan enigardon. Grava parto koncernas liajn literaturajn laborojn – poemojn kaj rakontojn origine verkitajn en Esperanto, tradukojn, inter ili «Faŭsto» de Goethe kaj «Trigroŝa Opero» de Brecht. Sproeck korespondis ekzemple kun la dana eldonisto Torben Kehlet (1941-2001), kun la kroata Esperanto-verkistino Zora Heide (nask. 1924), kun redaktoroj de gazetoj kiel Richard Reuchlin (nask. 1928, Germana Esperanto-Revuo) kaj Ferenc Szilágyi (1895-1967, Norda Prismo).



Fritz Wollenberg



Felix Zesch

Ankaŭ parto de liaj multnombraj recenzoj pri verkoj de la Esperanto-literaturo kaj publikaĵoj pri socisciencaj, lingvaj kaj mondkonceptaj temoj ekzistas kiel manuskriptoj.

«Kompreniĝo inter popoloj nur eblas, se la popoloj – ne nur manpleno da privilegiitoj – povas komprenebligi sin, se ili rekte, sen interpretistoj, povas interrilati.», skribis Sproeck.

D-ro Blanke memorigis pri postulo de la SPD-politikisto Carlo Schmid, kiun siatempe ankaŭ citis Sproeck: «Oni devas progresigi la konon de Esperanto.» kaj opiniis ke hodiaŭ estas grave progresigi la scion pri Esperanto, pri la lingva komunumo kaj pri Esperanto-kulturo ĉe eŭropaj institucioj kaj lingvosciencistoj.

D-ro Rudolf Fischer, prezidanto de GEA, substrekis ke aktualaj gvidlinioj de GEA pri lingva politiko estas formulitaj konscie pri la eblecoj kaj limoj de la aplikado de Esperanto en EU.

Tute praktike la Eŭropa-penso fariĝis per ĉeesto de junaj ukrainaj Esperanto-parolantinoj.

En 1960, unu jaron antaŭ la divido per la Muro, Sproeck organizis en Berlino Germanan Esperanto-Kongreson, kiu fariĝis granda renkontiĝo de homoj el Oriento kaj Okcidento. Pri tio memorigis Felix Zesch, prezidanto de ELB, kiu informis ke por 2012 jam komencis la preparoj de komuna Dana-Pola-Germana Esperanto-Kongreso en Berlino Lichtenberg, distrikto, en kies popola altlernejo estas instruata Esperanto.

D-ro Wolfgang Schwarz alvojaĝinta el Dreseno interesiĝis speciale pri la sekurigo de la altvaloraj materialoj kaj raportis pri simila agado en Dreseno.

Salutmesaĝoj kaj artaj programeroj

En sia salutmesaĝo, prof. Siegfried Heimann, prezidanto de la Historia Komisiono de Berlina SPD, ofertis prelegon pri la historio de SPD en Orienta Berlino ĝis

1961 kaj aldonis: «Mi deziras al via aranĝo honore al eminenta socialdemokrato multe da sukceso.»

Alia salutmesaĝo venis de la historiisto d-ro Ulrich Lins konata per la libro «La danĝera lingvo». Lins karakterizis Sproeck kiel gravan socialdemokraton en Laborista Esperantomovado kaj memoras: «Li restis en mia memoro pro sia neevitebla papilia kravato, sed pli pro sia nekaŝita antipatio kontraŭ sindetenoj... Nin junajn aktivulojn li ĉagrenis – jam antaŭ 1968 – per tiu aŭtoritate ŝajninta sinteno. Sed mi memoras ankaŭ pri lia kvieteco kaj pri lia berlina humuro.»



Arte kontribuis al la aranĝo Ulrich Wilke, Peter Kühnel kaj Peter Bäß, kiuj kantis erojn el la LEA-kantaro eldonita de Sproeck en 1926 kaj enhavanta ankaŭ de Sproeck tradukitajn kantojn. Peter Bäß akompanis per gitaro. Hartmut Mittag ludis rilate al la literatura kreado de Sproeck melodiojn per bekflutoj. Winjamin Rosenberg deklamis la Sproeck-tradukon de la kanto «Tord Foleson».

Dum diskutado ekestis proponoj,...

...pliigi la ekspozicion kaj montri ĝin pli longatempe en alia loko (ekzemple en Hejmregiona Muzeo de Prenzlauer Berg), plue ordigi, dokumenti kaj sekurigi la postlasaĵon (ekzemple en Federacia Arkivejo) kaj prepari broŝuron pri Sproeck kaj kun liaj verkoj.

Do sukcesa aranĝo, en kies efektivigado multaj berlinaj esperantistoj kunagadis.

Fritz Wollenberg

Dimanĉa sunradiado en Prenzlau

La suno brilis dum la 5-a de junio 2011, kiam denove kunvenis esperantistoj el Pollando, Bavario, Meklenburgio-Antaŭpomerio, Berlino kaj Brandenburgio por ĝui la etoson de Prenzlau.

Relative rapide pleniĝis la kunvenejo, kiu denove estis la Schützenhaus (pafista domo) – restoracio en Grabow-strato. Entute ni estis pli ol 20 personoj. La restoracio havas tre bonan strategian situon por la esperantistaro, ĉar la bela centro de unu el la perloj de la regiono Uckermark troviĝas preskaŭ apude.

Dank' al la organizintino Edeltraut Henning, atendis la partoprenantojn varia kaj interesa programo. La unua bela surprizo estis la komuna matenmanĝo, ĉar ja multaj el la ĉeestantoj havis sufiĉe longan vojaĝon kaj jam estis survoje dum kelkaj horoj.

Sekvis informoj pri diversaj aranĝoj kaj aferoj. Ĉar ankaŭ ĉeestis freŝbakitaj esperantistoj, tiuj okazis dulingve. Sed jam estas salutinda afero, ke tiuj samideanoj kuraĝis partopreni tiun aranĝon. Grava afero estis la monkollekto por Halina Gorecka, la eldonistino de «Ondo de Esperanto», kiu gravege malsaniĝis. Estis vera esprimo de solidareco.

Kortuŝe ankaŭ estis la prelego de d-ino Maria Jackowska el Szczecin pri ŝia trisemajna laboro en Haitio. Kvankam la kuracistoj laboris ĝis elĉerpiĝo kaj pagis sian restadon en la katastrofa regiono, ili tamen deziras reveni por helpi. Post la sentimentalaj vortoj sekvis multaj bildoj, kiuj emfazis la travivaĵojn kaj ankaŭ la belecon de la naturo kaj la arkitekturo de Haitio.



Pro la bela vetero – la gastoj ŝatis tagmanĝi ekstere kaj pro diversaj antaŭe okazintaj teknikaj problemetoj – ne prezentebis filmeto pri Prenzlau. Sed ni konservis ĝin por la sekvonta fojo, do antaŭĝoju.

Je la 14a horo ni renkontiĝis antaŭ «Ökostation» (ekologia stacio), kie ni estis bonvenigitaj de la kunlaborantino. Post enkondukaj vortoj ni havis eblecon konatiĝi kun la tereno kaj esploris ĉiujn viziteblajn angulojn. La aranĝadon de la iama rubaĵejo kaj de la diversaj instalaĵoj tre admiris la partoprenantoj kaj ili laŭdis la tutan projekton. Cetere ja temis ekzakte pri la tago de naturmedio, kiam ni estis en tiu interesa ejo.

Fina kulmino estis la kutima kafoklaĉo ĝis la adiaŭo. Lunde ja denove estis labortago.

Ĝenerale estas salutinda, ke elektiĝis semajnfina tago por la renkonto.

Ni ĉiuj jam antaŭĝojas pri la evento en 2012.

Ronald Schindler

Piratoj kaj Esperanto

Dum la lasta CSD (Christopher Street Day) rimarkeblis ke la gazeto de la Piratpartio Germanio ankaŭ disponeblis en Esperanto. Tiu tiklis nian intereson kaj ni demandis Thomas Würfel (Unua Maato de la Pirata ŝipanaro Lumturpinto en Lichtenberg) tiuteme:

EIBB: Kia estas la sinteno de la Piratpartio al lingvoj ĝenerale kaj aparte al Esperanto?

ThW: Lingvo estas ŝlosilo al klereco. Libera aliro al informoj, scio kaj edukado estas kondiĉo por la kunvivado en nia socio. Ĝi baziĝas sur lingva

kompetenteco. Ĉiu lingvo – ankaŭ Esperanto – estas ŝlosilo al kulturo. La lernado de pluraj lingvoj pligrandigas la kulturen horizonton. Ju pli granda la lingva kompetento des pli facila estas la interkompreno en nia socio. La berlinaj

Piratoj bonvenigas la konceptojn de du- kaj plurlingva edukado.

EIBB: Por kio la Piratpartio uzas Esperanton?

ThW: La Piratoj uzas Esperanton por malfermi sian komunikadon al negermanparolantoj. Ni tradukis niajn programojn por la tutgermana baloto en 2009 same kiel tiun por la venonta berlina baloto. Ankaŭ la plurlingva eldono de la berlina Pirata gazeto « Kaperbrief » por la Karnavalo de Kulturoj, la Gegeja Urbofesto en Schöneberg kaj la CSD-manifestacio enhavis

Esperantan tradukon de nia familipolitika programo.

EIBB: Ĉu ankaŭ en la Reto aŭ pli vastskale en la reala vivo?

ThW: Nia interreta opinisondilo Liquid Feedback estas uzebla ankaŭ en Esperanto inkluzive de agordoj kaj ampleksaj helptekstoj. Piratpartioj de la tuta mondo uzas ĝin. Do, Esperanto ĉe la Piratoj kontribuas al la internacia komunikado kaj estas ankaŭ pontolingvo en la granda Pirata universo.

Raporto pri la 88a Germana Esperanto-Kongreso en Münster

Monastero (=Münster) situas en regiono «sen oriento»: en Vestfalujo (Westfalen).

Tra Monastero fluas rivero, kies nomon ĉiu malgranda infano konas, la plej mallonga mondscale: Aa.

Partoprenis 133 homoj el 10 landoj: la plejmultaj el Germanio, la duoplejmultaj el Nederlando, el Berlin 9: Detlev kaj Wera Blanke, Ina Tautorat, Elisabeth Schwarzer, Henryk Wenzel, nia nova kasisto, Felix Zesch, nia nova prezidanto, Peter Kühnel kun amikino kaj mi.



Turo de la Lamberta preĝejo kun la tri korboj

Monastero havis revolucion estintecon: la rebaptistoj forigis monon; ĉiu viro havis rajton edziniĝi al pluraj virinoj; bapto estis valida nur se la bapto estis plenkreska.

Tioman revolucion la eklezio kaj la feŭdalistoj ne toleris kaj batalis pro potenco. La tri estroj de rebaptistoj estis publike torturataj kaj mortigataj. La venkintoj elpendigis iliajn kadavrojn en tri feraj korboj ĉe la Lamberta preĝejo. La korboj pendas ankoraŭ nun tie. Alia kuraĝa batalanto estis la episkopo Galen: li predikis kontraŭ decidoj de faŝista registaro. Lia fameco protektis lin.

Nin partoprenantojn akceptis komitato en stacidomo kaj transdonis al ĉiu membrolegitimilon; la legitimilo estis ankaŭ veturbileto. Tio estis bona, ĉar nia kongresejo situis en la okcidenta rando de la urbo en kristana domo. Multaj de ni loĝis tie kaj la resto en proksimeco.

La Esperanto-societo Monastera festis sian 100-jariĝon. La slogano de kongreso estis: «Najbaroj en Eŭropo». Dum la unua vespero ĝojigis nin ĥoreto vira kun la nomo « Kiepenkerle » (« Dorskorbuloj »). La ĥoristoj kantis kantojn regionajn en basgermana dialekto kaj en Esperanto (ĉi-tie kunkantis, eĉ kiel solisto d-ro Fischer, la prezidanto de GEA kaj de loka komitato).

Dum la kongreso ni havis okazojn aŭdi interesajn prelegojn, ekz. de d-ro Blanke pri Esperanto-kulturo. Ĉiutage estis diservoj ekumenaj.

Dum membrokunveno ni elektis novan estraron de GEA; ĝi estas la malnova, nur unu estrarano estas nova: Felix Zesch.

Dum ekskurso ni vizitis proksiman kastelon Hülshoff, la loĝejon de verkistino Anette von Droste-Hülshoff. En nia kongreslibro estas printita poemo de ŝi, « Der Junge im Moor », esperantigita de Manfredo Ratislavo en la jaro 1991. Mi citas la unuan strofon:

La knabo en la marĉo

Timige estas iradi tra
La marĉ' en duonmallumo,
Se kroĉtrikas ramptigoj kaj turnas la
Fantomoj sin el la fumo.
Elsaltas sub ĉiu pieda tret'
Elfende siblante fontanet'.
Timiga estas la marĉo ja,
Se kraketas la kana ventumo.»

Ulrich Wilke

Salutoj el Kiel

Karaj Berlinaj kaj Brandenburgiaj Esperantistoj,



La Esperantistoj el la urbo Kiel volas saluti vin per kelkaj fotoj. Ni estas nur kvin en Kiel kaj ĉirkaŭaĵo, tamen ni regule unufoje ĉiumonate renkontas kaj vere ĉiam preskaŭ ĉiuj venas.

Kutime ni renkontiĝas en restoracio inter la 17a kaj 20a h kaj manĝas, trinkas iom kaj parolas kaj Esperante kaj germanlingve. Estas iomete simile al la plenbuŝa rondo en Berlino.

Kelkfoje ni ankaŭ renkontiĝas en pli malgranda rondo kaj promenas (ekzemple tra standoj de la Kijla Semajno), iras en kinejo aŭ renkontas hejme ktp.

Do, se vi iam vizitos la urbon Kiel, vi trovos nin la duan mardon de la monato en la restoracio «Le Buffet» ĉe la centra stacidomo ekde la 17a h. Ni ĉiam ĝojas se venas vizitantoj. Korajn salutojn el Belmonto (Schönberg Holstein)

Beate Mielke

Gvidado en Komputilluda Muzeo en Esperanto



Foto: Jéssica Frazão

La 7an de julio enkondukis Chuck Smith grupeton da berlinanoj kaj turistoj en la historion de komputilaj ludoj. Post la gvidado en Esperanto restis iom da tempo por provludado.

Felix Zesch

Invito al Somera festo en Jüterbog

Ankau ĉijare Esperanto-Asocio Berlin-Brandenburgio invitas al la somera festo sur la grundo de familio Langer en Jüterbog, Ziegelstraße 35, kun antaŭprogramo en la monaĥejo Kloster Zinna.

Sabate, la **27-an de aŭgusto** je la **12a horo** ni renkontiĝos antaŭ la monaĥejo de Zinna por ĝui la historion kaj etoson de tiu loko (enirbileto 5,00 €, individue pagenda); post tio (ĉ. 15a h) atendos nin ĝardeno kun tenistablo, naĝbaseneto kaj kradorostilo en bela pli ol miljaraĝa urbo, kiu situas sude de Berlino.

Tranoktemuloj (2011-08-26/27) kunportu tendon kaj dormsakon aŭ memstare turnu sin al la listo de gastigantoj en Jüterbog (http://www.jueterbog.eu/cms/front_content.php?idcat=182). Por manĝaĵoj kaj trinkaĵoj ĉefe zorgos Carola kaj Irina.

Kotizo: 5,00 €; rabatita kotizo 2,50 € por gastoj el Pollando, infanoj, studentoj, senlaboruloj.

Denove la distanco inter Berlino kaj la festejo estas iomete pli granda, pro tio bv. doni informon pri via partoprendeziro al Carola Langer, Ziegelstraße 35, D-14913 Jüterbog – nur retpoŝte: carola-langer@web.de. Pro malmultekosta trajnbileto «Schönes-Wochenendticket» indas komune veturi. La dissendolisto [esperanto-berlin@yahoogroups.de] estas bona rimedo por trovi kunveturemulojn.

Propono por alvojaĝo: (27,00 EUR/5 pers., Brandenburg-Berlin-bileto)

RE 5 stacio	alveno	forveturo	kajo
S+U Berlin Hauptbahnhof (tief)		10:16	4
S Südkreuz Bhf (Berlin)	10:22	10:24	4
Luckenwalde, Bahnhof	10:54		3
per aŭtobuso al Kloster Zinna, Markt	11:49	11:32	linio 753
al Jüterbog (Zinnaer Vorstadt)		14:00	linio 753

Propono por revojaĝo:

RE 5 stacio	alveno	forveturo	kajo
Jüterbog, Bahnhof		22:55	2
Luckenwalde, Bahnhof	23:02	23:03	4
S Südkreuz Bhf (Berlin)	23:40	23:41	
S+U Potsdamer Platz Bhf (Berlin)	23:44	23:45	3
S+U Berlin Hauptbahnhof (tief)	23:47		4

Jubilea festo de la Esperanto-domo

Kiel anoncite en la pasinta informilo, jen la programo por la jubilea festo de la Esperanto-domo, la

13-an de aŭgusto 2011, Einbecker Str. 36

14a h Salutado kun kafo

15a h Enkonduko en la redaktadon de la nova retpaĝaro esperanto.de/bb

16a 15 h Filmo "The Universal Language" (30 min, en la angla kun subtekstoj en Esperanto)

17a Gvidado tra la Esperanto-domo

Se eblas, bv. kunporti vian propran tekokomputilon por la prelego pri redaktado de la retpaĝaro. Ni povas disponigi nur limigitan kvanton de komputiloj.

Einladung zur Jahreshauptversammlung Esperanto-Jugend Berlin (EJB)

Zeit: Sonntag, 18.09.2011, 15 Uhr

Ort: Geschäftsstelle der Deutschen Esperanto-Jugend e.V., Einbecker Str. 36, 10317 Berlin-Lichtenberg

Tagesordnung der JHV der EJB

1. Eröffnung
2. Feststellung der Stimmberechtigung und Beschlussfähigkeit
3. Wahl eines Versammlungsleiters
4. Wahl eines Protokollführers
5. Abstimmung über die Tagesordnung
6. Diskussion über Vorstands- und Kassenbericht
7. Entlastung des alten Vorstands
8. Abstimmung über Auflösung des Vereins
9. Wahl des neuen Vorstands
10. Arbeitsplan und Haushaltsplan für das kommende Geschäftsjahr

Antrag von Felix Zesch:

«Aufgrund des Ausscheidens zahlreicher aktiver Mitglieder durch Überschreiten der Altersgrenze hat der Verein in letzter Zeit viele Mitglieder verloren. Zwar gibt es immer noch genug Mitglieder für einen Verein, aber zu wenig aktive. Daher stelle ich den Antrag auf Auflösung der Esperanto-Jugend Berlin.»

Auszug aus der Satzung der EJB vom 12.12.1993:

§ 9 (2) Beschlüsse der Hauptversammlung über Satzungsänderungen, Auflösung der EJB sowie über Ausschlüsse von Mitgliedern sind nur zulässig, wenn die Antragstexte den Mitgliedern mindestens 4 Wochen vor Beginn der Hauptversammlung bekanntgegeben wurden. Für Satzungsänderungen ist eine Zweidrittel-Mehrheit, für die Auflösung eine Vierfünftel-Mehrheit der anwesenden ordentlichen Mitglieder erforderlich.

Einladung zur außerordentlichen Hauptversammlung der Esperanto-Jugend Brandenburg-Berlin (EJBB)

Zeit: Sonntag, 18.09.2011, 15.30 Uhr

Ort: Geschäftsstelle der Deutschen Esperanto-Jugend e.V., Einbecker Str. 36, 10317 Berlin-Lichtenberg

Der Vorstand lädt zur außerordentlichen Hauptversammlung, um über die Auflösung des Vereins abzustimmen. Grund ist ein Antrag von Felix Zesch:

«Aufgrund des Ausscheidens zahlreicher aktiver Mitglieder durch Überschreiten der Altersgrenze hat der Verein in letzter Zeit viele Mitglieder verloren. Zwar gibt es immer noch genug Mitglieder für einen Verein, aber zu wenig Aktive. Daher stelle ich den Antrag auf Auflösung der Esperanto-Jugend Brandenburg-Berlin.»

Tagesordnung der außerordentlichen JHV der EJBB

1. Eröffnung
2. Feststellung der Stimmberechtigung und Beschlussfähigkeit
3. Wahl eines Versammlungsleiters
4. Wahl eines Protokollführers
5. Abstimmung über die Auflösung des Vereins

Auszug aus der Satzung der EJBB vom 07.11.2003:

§ 11 Auflösung

(1) Die Auflösung der EJB kann nur in einer besonderen, zu diesem Zweck einberufenen außerordentlichen Hauptversammlung mit einer 4/5-Mehrheit der anwesenden Mitglieder beschlossen werden.

(2) Bei Auflösung der EJB oder bei Wegfall steuerbegünstigter Zwecke fällt ihr Vermögen an die Deutsche Esperanto-Jugend e. V., die es unmittelbar und ausschließlich für steuerbegünstigte Zwecke zu verwenden hat.

Bei Ablehnung des Antrags findet im Anschluss die reguläre Jahreshauptversammlung statt.

Einladung zur Jahreshauptversammlung der Esperanto-Jugend Brandenburg-Berlin (EJBB)

Zeit: Sonntag, 18.09.2011, 16.00 Uhr

Ort: Geschäftsstelle der Deutschen Esperanto-Jugend e.V., Einbecker Str. 36, 10317 Berlin-Lichtenberg

Tagesordnung der JHV der EJBB

1. Eröffnung
2. Feststellung der Stimmberechtigung und Beschlussfähigkeit
3. Wahl eines Versammlungsleiters
4. Wahl eines Protokollführers
5. Abstimmung über die Tagesordnung
6. Diskussion über Vorstands- und Kassenbericht
7. Entlastung des alten Vorstands
8. Wahl des neuen Vorstands
9. Arbeitsplan und Haushaltsplan für das kommende Geschäftsjahr

Kandidatoj por la estraroj

Für die Vorstandsposten in EJB und EJBB kandidieren:

- Irina Gerasimova
- Ursula Sachsenröder
- Chuck Smith
- Felix Zesch

kandidatiĝas por la estrarpostenoj en EJB kaj EJBB.

Pliaj kandidatoj bonvenas. Oni ne devas plenumi aĝlimon nek havi germanan ŝtatanecon por postenumi kaj aktivi.

Klarigo pri la formalaj rilatoj inter EJB, EJBB kaj GEJ

EJB estas loka grupo de GEJ (respondeca por la urbo Berlin)

EJB estas loka grupo de EJBB (respondeca por la urbo Berlin)

EJBB estas landa asocio de GEJ (respondeca por Berlino kaj Brandenburgio)

Praktike en la lasta tempo ĉiam la samaj aktivuloj gvidis EJB kaj EJBB.

Por la ministerio kaj EJB kaj EJBB estas landaj asocioj de la Germana Esperanto-Junularo (GEJ), por Berlino (EJB) kaj Brandenburgio (EJBB).

GEJ estas suborganizo de la Germana Esperanto Asocio (GEA), same kiel ELB kaj EABB.

Laborlingvoj estas la germana kaj Esperanto, tradukoj okazos laŭbezone. Arbeitssprachen sind Deutsch und Esperanto. Übersetzungen finden nach Bedarf statt.

Felix Zesch

für die Vorstände der Esperanto-Jugenden Berlin und Brandenburg-Berlin

Wichtige Mitteilung zur Beitragszahlung

Auf die seit dem 1. Januar 2011 wirksamen Änderungen der Mitgliedsbeiträge und der Zahlweise war in der Dezemberausgabe ausführlich eingegangen worden. Da dennoch einige Zahlungen, wie in der Vergangenheit gehandhabt, auf dem Konto des Landesverbandes eingingen, sei hier nochmals darauf hingewiesen: Die Überweisung der Beiträge erfolgt ab 2011

direkt auf das Konto des Deutschen Esperanto-Bundes Nr. 860 3600 bei der Sozialbank Mainz Bankleitzahl 550 205 00. Die Erteilung einer (jederzeit widerrufbaren) Einzugsermächtigung wird empfohlen.

Der Vorstand des Esperanto-Verbands
Berlin-Brandenburg

Prelego ĉe la Verein Deutsche Sprache

La prezidanto de EABB prelegis la 6an de julio en la regula klubkunveno de la regiona grupo de la Verein Deutsche Sprache pri la lingvopolitikaj pozicioj de GEA. La 14 ĉeestantoj reagis precipe favore al la ideo uzi la propedeŭtikan efikon de Esperanto

en la klerigo de infanoj. La prezidantoj de la asocioj alstrebas pluan kunlaboron. Artikolo pri la evento aperis en Libera Folio <http://www.liberafolio.org/2011/germana-esperanto-asocio-sercas-aliancinojn>

Felix Zesch

Kontaktoj:

Germana Esperanto-Asocio

Einbecker Straße 36, 10317 Berlin, infozentrum@esperanto.de

konto: 860 3600 ĉe Sozialbank Mainz (banka kodo: 550 205 00)

**Ekde 2011 ĉiuj brandenburgiaj kaj berlinaj esperantistoj direkte
demandojn rilate al sia membreco rekte al la supra adreso!**

Esperanto-Asocio Berlin-Brandenburgio kaj Esperanto-Liga Berlin e. V:

Einbecker Straße 36, 10317 Berlin,

eabb@esperanto.de

konto: 70550102 ĉe Postbank Berlin (banka kodo: 10010010)

Prezidanto: Felix Zesch, tel.: 030 81809112

Vicprezidanto: Ronald Schindler, tel.: 033605 524138

Berlina Esperanto-Junularo:

Einbecker Straße 36, 10317 Berlin

ej.berlin@esperanto.de

tel.: 030 428 578 99

EsperantoLand e.V. :

Lu Wunsch-Rolshoven, tel.: 030 685 5831, esperantoland@esperantoland.de,

www.EsperantoLand.de

Esperanto? Plenbuŝe! - praktikada tablorondo:

Philippe Beaudonnet, tel.: 030 217 562 33, philippe.beaudonnet@gmx.net

Ĵaŭda Rondo:

renkontiĝejo: Einbecker Straße 36, 10317 Berlin, tel. 030 428 578 99

Grupo Lietzensee:

Hans Moser, tel.: 030 8621411

Presindikoj

Eldonas: Esperanto-Asocio Berlin-Brandenburgio

Kompilis kaj enpaĝigis: Philippe Beaudonnet (eibb@esperanto.de)

Reta versio: www.esperanto.de/bb, **reta dezajno:** Chuck Smith

**Esperanto-Informilo Berlino-Brandenburgio estas la oficiala organo
de Esperanto-Asocio Berlin-Brandenburgio kaj de Esperanto-Ligo Berlin**

Esperanto-Kalendaro por aŭgusto kaj septembro 2011

Ĉiun ĵaŭdon je la 20a horo *Ĵaŭda Rondo*, Berlin, Einbecker Straße 36

Aŭgusto

1-a, lundo	19a	<i>EsperantoLand</i> , renkontiĝo en kafejo «Arema», Birkenstraße 30, 10551 Berlin (metrostacio Birkenstr.)
8-a, lundo	19a 30	<i>Danziger 50. Kien iri en Berlin kun gastoj?</i> Interesaj lokoj kaj eventoj en Berlino en somero 2011. Kun partopreno de gasto el Irano.
13-a, sabato	14a	<i>Einbecker Str. 36:</i> Jubilea festo de la Esperanto-domo. Vidu inviton p. 7.
19-a, vendredo	19a	<i>Einbecker Str. 36:</i> Ole Kreins, SPD, prezidanto de SPD-Friedrichsfelde diskutos kun Esperanto-Junularo Berlin.
22-a, lundo	19a 30	<i>Danziger 50. Famaj Esperantistoj en Berlino.</i> Personoj, lokoj, eventoj.
26-a, vendredo	20a	<i>Esperanto? Plenbuŝe!</i> paŭzas pro ferioj
27-a, sabato	15a	<i>Somera Festo en Jüterbog.</i> Vidu inviton p. 7.

Septembro

5-a, lundo	19a	<i>EsperantoLand</i> , renkontiĝo en kafejo «Arema», Birkenstraße 30, 10551 Berlin (metrostacio Birkenstr.)
7-a, merkredo	18-19a 30	<i>Esperanto-Kurso:</i> porkomencanta kurso (A1) en VHS Lichtenberg, kurso Li4.26-010H – merkrede
8-a, ĵaŭdo	18-19a 30	<i>Esperanto-Kurso:</i> pliboniga kurso (A2) en VHS Lichtenberg, kurso . Li4.26-011H – ĵaŭde
9-a, vendredo	14a	<i>Lietzensee:</i> Pianocafé en Herbartstr./Neue Kantstraße 20, 14057 Berlin – babilado kaj kantado, kafoklaĉo
9-a, vendredo	18a h 30	<i>Einbecker Str. 36:</i> Publika estrarkunsido de ELB kaj EABB
16-a, vendredo	15 h	<i>Lietzensee:</i> ni festas la 90jariĝon de sinjorino Maria Baier – Werner-Bockelmann-Haus, Bundesallee 49, Wilmersdorf, granda festosalono en la teretaĝo
23-a ĝis 25-a		ArKonEs – Artaj Konfrontoj en Esperanto en Poznań, Pollando (www.arkones.org)
30-a, vendredo	10-11a	<i>Lietzensee:</i> Café Blissestr. 14 - lumbildprezento pri «Esperanto kaj la Eklezio» kun diskuto.
30-a, vendredo	20a	<i>Esperanto? Plenbuŝe!</i> – praktikada tablorondo